der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

16. Jahrgang Nr. 102 (4/1980) ISSN 0014-0619 30 Pf

# Komunikaĵo pri la 13a Konsultiĝo

De la 18a ĝis 23a de aprilo 1980, en Sofio, Bulgario, okazis la 13a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. La Konsultiĝon, kiu pasis sub la signo de la 110a datreveno de la naskiĝtago de V. I. Lenin, partoprenis reprezentantoj de jenaj organizaĵoj: Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko, Asocio de Sovetaj Esperantistoj, Bulgara Esperantista Asocio, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Pola Esperanto-Asocio, Hungara Esperanto-Asocio kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

La partoprenintaj delegitaroj traktis komuninteresajn problemojn de la internacia Esperanto-movado, interŝanĝis spertojn kaj informojn pri la kunlaboro inter siaj landaj organizaĵoj, aparte substrekante la rolon de Esperanto en la internacia pacbatalo. Oni plue akcentis la neceson de sistema edukado kaj kvalifikado de esperantistaj aktivuloj, la esploron de la sciencaj aspektoj de Esperanto kaj la aplikon de la Internacia Lingvo por scienco kaj tekniko. La delegitoj interkonsentis pri aktivecoj rilatantaj la celebradon de la 1300-jara jubileo de la Bulgara Ŝtato en 1981. La Konsultiĝo notis sian maltrankviliĝon pri la akriĝo de la internaciaj rilatoj. *Oni esprimis sian esperon, ke la tutmonda esperantistaro en sia agado ne allasos negativajn sekvojn de tiu akriĝo.* La partoprenintaj organizaĵoj emfazis sian pretecon ĉion fari por harmonia pluevoluigado de la internacia Esperanto-movado, substrekante, ke *necesas reciproka respekto de la interesoj, vidpunktoj kaj enlandaj labormetodoj.*

La Konsultiĝo akceptis rezolucion solidare al la popoloj kaj la esperantistoj de Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio.

Al Bulgara Esperanta-Asocio la partoprenintistaj delegitoj esprimis sian dankon pro la bonegaj laborkondiĉoj, kiuj ebligis intensajn kaj rezultodonajn traktadojn.

Sofio, 23. 4. 1980

# Aprile en Bulgario

Malgraŭ la numero de la Konsultiĝo, 13, ĝi estis ankaŭ ĉijare tre sukcesa kaj distingiĝis ne nur per abundega tagordo sed ankaŭ per bonegaj preparo kaj organizado flanke de la bulgaraj gastigantoj. Profundaj kaj intensaj duskutoj pri principaj kaj detalaj problemoj de la internacia Esperanto-movado helpis al elformado de komunaj starpunktoj, kio grave helpos al plia plibonigo de la multflanka kaj duflanka kunlaboro de la organizaĵoj en la socialismaj ŝtatoj.

Unu el la plej gravaj temoj, tion tre klare montris la Konsultiĝo, estas la sistema pretigado de politike, lingve kaj fake kapablaj funkciuloj kaj aktivuloj de la Esperanto-movado en la unuopaj landoj, tasko, ĉe kies realigo doniĝas bonegaj eblecoj de kunlaboro. Oni fondis komisionon kiu ellaboru sub gvido de d-ro M. Dobrczynski konvenan bazan materialon. El GDR la komisionon eniris Jürgen Hamann. Ankaŭ la scienca agado (interlingvistiko/esperantologio kaj scienca apliko de Esperanto) trovis vastan atenton. La Konsultiĝo fondis konstantan komisionon sub gvido de prof. Isajev, kiu klopodos kunordigi la interlingvistikan/esperantologian agadon en la partoprenintaj landoj. El GDR la komisionon eniris Detlev Blanke.

Oni kun aparta ĝojo salutis la delegitojn de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj aŭskultis kun granda atento iliajn informojn kaj raportojn (vidu eltiron sur paĝo 75). En la komisionon por solidareco al Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio, gvidata de D. Haĝiev, el GDR eniris R. Hahlbohm. Ankaŭ regis interkonsento pri partopreno de la esperantistaj organizaĵoj en la partoprenintaj landoj en la celebrado de 1300a jubileo de la bulgara ŝtato en la jaro 1981.

La bulgaraj gastigantoj ofertis al la gastoj du vere tre kortuŝajn vesperojn kun riĉa kultura programo. Dum la lasta Nikola Aleksiev en aparta parolado omaĝis al Rudolf Hahlbohm, prezidanto de CLE, okaze de lia 70a naskiĝtago. Nikola Aleksiev kaj Ĥ. Gorov estis distingitaj per la Honorinsigno de CLE.

Post la Konsultiĝo mi havis la agrablan taskon veturi prelegcele al Plovdiv kaj Karlovo. En Plovdiv mi partoprenis partatempe tre interesan bulgaran aranĝon, la festivalon de la sciencfikciaj kluboj kaj tie esprimis la opinion, ke la estonta homaro solvos la lingvo-problemon pere de planlingvo. Sekvis prelegoj antaŭ ĉ. 120 studentoj de la filologia fakultato de la Plovdiva universitato, antaŭ instruistoj de la germana lingvo en gimnazioj de Plovdiv kaj tri pliaj en la kadro de aktivula seminario en Karlovo. Ĉiam denove la restado en tiu esperantmovade ege vigla lando, konata pro siaj gastamaj homoj, estas riĉa kaj neforgesebla travivaĵo.

*Detlev Blanke*

# La revolucio antaŭenmarŝas . . .

*Eltiro el la parolado de Vu Kan dum la 13a Konsultiĝo.*

. . . Dum sia pasinta dudek-kvarjara ekzisto, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA), konstante fidela al la idealoj de Zamenhof kaj de Lenin, jam direktas siajn klopodojn al la naciliberiga afero kaj al la konstruado de la socialismo, kunage kun la plifortigo de la amikeco kun aliaj popoloj kaj la plifirmigo de la mondpaco. Dum pluraj jaroj, ni sukcesis konservi vastan movadon, sed la seninterrompaj militoj kun ties longedaŭraj sekvoj multe malhelpis niajn aktivecojn.

Nia asocio naskiĝis du jarojn post la fino de la naŭjara agresmilito fare de la francaj koloniistoj. Kaj nelonge post tio, eksplodis la usona agresmilito, kiu efektive daŭris dekkvin jarojn, de 1960 ĝis 1975. . . .

Apenaŭ bankrotis la usona novkoloniismo en Sud-Vjetnamio, tuj ekaperis nova malamiko: la ekspansiismo kaj la hegemoniismo de la granda nacio de Pekino. La maŭistoj de la metropolo ordonis al siaj lakeoj Pol Pot/Jeng Sary okazigi nedeklaritan militon kontraŭ Vjetnamio, ĝuste kiam nia lando estis komplete liberigita. . . .

Kontraŭ la volo de niaj komunaj malamikoj, la revolucio antaŭenmarŝas en Vjetnamio, kie nia popolo, profitante el la frata helpo de Sovet-Unio kaj de aliaj socialismaj landoj, estas sukcese plenumanta ambaŭ paralelajn taskojn: konstrui la socialismon kaj defendi la socialisman landon. Ĝi antaŭenmarŝas en Laoso kaj menciinde en Kampuĉio, post la nigraj jaroj de la polpota genocido. La lukto por la paco kaj malarmado de la mondaj popoloj estas trapasanta maldaŭrajn obstaklojn por fine pli forte disvolviĝi, kaj la internacia lingvo Esperanto, efike servanta al la paco kaj socialismo, restos por ĉiam la lingvo de la amikeco kaj internacia kunlaborado.

Restas nur kelkaj tagoj kaj [1]), la 22an de aprilo 1980, la homaro festos la 110-jaran jubileon de la naskiĝtago de Lenin. La 19an de majo 1980, nia vjetnama popolo celebros la 90an naskiĝdatrevenon de Prezidanto Ho Chi Minh. Poste laŭ la iniciato de Monda Packonsilantaro ni festos la 600an naskiĝdatrevenon de Nguyen Tran, la granda poeto kaj humanisto de Vjetnamio, genia politikisto kaj strategо, kiu siatempe gvidis la popolon en ties batalo por forpeli la ĉinajn invadintojn. Kaj ne estas hazarde, ke nun ni havas la honoron restadi ĉi-tie, en Sofio, ripozloko de Georgi Dimitrov, la granda filo de la bulgara popolo, unu el la revolucioj gvidantoj, kiu postlasis neforviŝeblan stampon en la internacia komunista kaj laborista movado. Flanke-ĉe-flanke kun la esperantistoj de la socialismaj landoj kaj en la tuta mondo, ni, vjetnamaj esperantistoj, memkonscie sekvas la paŝosignojn de tiuj grandaj homoj por realigi la idealon de nia majstro d-ro Ludoviko Zamenhof.

---

[1]) La prelego estas prezentita la 20an de aprilo 1980.

## Rezolucio pri solidareco

Konsiderante la ekstreme strecan situacion, kiu kreiĝis en Hindoĉinio kaŭze de la grandpotenca ekspansiisma kaj hegemoniisma politiko de Pekino, politiko konscie kuraĝigata de Vaŝingtono kaj de aliaj internaciaj reakciaj fortoj;

Farante konsekvencajn konkludojn el la lasta agresmilito kondukita de la ĉinaj trupoj kontraŭ Vjetnama Socialisma Respubliko de la 17a de februaro ĝis la 16a de marto 1979, kaj decidante kontraŭstari al ĉiuj maljustaj perfortaj agoj, kune kun ĉiuj porpacaj kaj progresemaj fortoj;

Dezirante helpi al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio defendi sian nacian sendependecon, konstrui socialismon kaj disvolvi E-movadon en paco kaj internacia kunlaboro;

Ni, la partoprenantoj de la 13a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, okazinta en Sofio de la 19 - 24 de aprilo 1980, unuanime:
– manifestas nian fratan subtenon al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio kaj nian volon kontribui al la disvastiĝo de la internacia lingvo en tiu ĉi landoj;

– fondas solidarec-komisionon kun la popoloj kaj la esperantistaro de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laosa Popoldemokratia Respubliko kaj Kampuĉia Popola Respubliko konsistantan el la jenaj personoj:

D. Haĝiev – BEA (prezidanto)
R. Hahlbohm – CLE (vicprezidanto)
D. Perevalov – ASE (vicprezidanto)
L. Kosieniak – PEA
D. Koĉvara – ČEA
Eva Farkas – HEA
A. Lukaĉ – AESSR

– alvokas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn en la socialismaj landoj kaj en la tuta mondo, laŭ iliaj eblecoj, liveri adekvatan helpon, kaj moralan kaj materialan, al la esperantistaj movadoj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso Popoldemokratia Respubliko kaj Kampuĉia Popola Respubliko.

Sofio, la 21an de aprilo 1980

*

### UN-rezolucio pri pacedukado en Esperanto

Pola Esperanto-Asocio aperigis la Esperantan tradukon de la Deklaro de Unuiĝinta Naciaro pri la edukado de la socioj en la spirito de la paco.

Estis Pollando, kiu projektis tiun deklaron por la ĝenerala asembleo de UN, kiu en sia 33a sesio akceptis ĝin.

Oni povas peti ekzemplerojn de la Deklaro ĉe Pola Esperanto-Asocio. (Pl-00-013-Warszawa 1, ul. Jasna 6) (UN kaj ni, 16)

## DEKLARO

Granda kunveno, okazanta la 23an de aprilo 1980 en Sofio, en kiu partoprenas esperantistoj el 8 landoj, kun granda maltrankvilo konstatas la plifortigon de la politika streĉo en la mondo. La imperiistaj fortoj kaj precipe Usono kaj NATO iniciatis la reokazigon de malvarma milito, kiu alprenis neatingitan antaŭe amplekson. Usono uzas bojkotojn kaj aliajn formojn de ĉantaĝoj. La Blanka Domo malkaŝe prenis kurson de la plifortigo de vetarmado, kies celo estas renversi la ekzistantan ekvilibron de militfortoj por povi rilati al Sovetunio kaj al la aliaj socialismaj landoj el la pozicio de forto. La usona registaro malkaŝe deklaris la intencon interveni en internajn aferojn de evoluantaj landoj, kiuj ne deziras plu toleri la novkoloniisman ekspluatadon. Usono bremsas la justan solvon de la konflikto en Proksima Oriento, estigas novajn militbazojn en la regiono de la Persa golfo kaj minacas Iranon per militoperacoj.

Ni kategorie kondamnas tiujn agojn danĝerajn por la homaro.

Ni — fidelaj al la principoj de la paca kunekzistado, difinitaj unue de Lenin, kies 110an naskiĝdatrevenon solenas nun la tuta progresema mondo — apelacias al la tutmonda esperantistaro firme batali kontraŭ la aspiroj de la imperiistoj eksplodigi novan mondmiliton. Ni apelacias por la plifirmigo de la paco sur la tero.

## *Ĉe dormanta infano*

1. *Jen kuŝas vi en lito,*
   *kapeto sur kusen'.*
   *Laciga la viveco:*
   *ŝiriĝis ĵus la ĉen',*
   *nun regas pasiveco.*

2. *Kondukas al medito*
   *pri la infana viv':*
   *Eterne floras majo ...*
   *Ekzistas ja motiv'*
   *por tia multa gajo.*

3. *Kaj fine, kun subito*
   *ekvenas la kompren' —*
   *apenaŭ restas dubo:*
   *Pro via senzorgplen'*
   *vin mankas ĉia nubo!*

4. *En nia vivkvalito*
   *ne nur ekstera pac'*
   *heligas la ĉielon,*
   *vi sen mizerminac'*
   *tutĝuas flormielon ...*

*Alfred Knapp*

# 11a plenkunsido de CLE kun esltara lingvisto

La 11a plenkunsido de Centra Laborrondo Esperanto, okazinta la 13an kaj 14an de junio 1980 en Magdeburg, havis specialan karakteron. Partoprenis ĝin oficialaj delegacioj de *Ĉeĥa Esperanto-Asocio* (prezidanto d-ro J. Jermař kaj vicprezidantino V. Podhradska) kaj de la Asocio de Esperantistoj *en Slovaka Socialisma Respubliko* (la vicprezidanto E. Tvarošek, membroj de la Junulara Komisiono E. Gajdašikova kaj A. Ivakova), kiuj informis pri la agado de siaj landaj asocioj.

Tre grava evento krome estis la monumenta prelego de profesoro d-ro Georg Friedrich Meier pri „Aspektoj de internacia lingva komunikado". Profesoro Meier estas *unu el la plej elstaraj lingvistoj de GDR kun internacia reputacio.* Li estas profesoro por komunikada scienco en la Humboldt-Universitato de Berlin (GDR), ĉefredaktoro de la plej grava lingvoscienca revuo de GDR „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung" (revuo por fonetiko, lingvistiko kaj komunikada esploro), membro de la prezidio de la Centra Konsilantaro pri Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR, aŭtoro de fundamentaj studoj pri lingvistiko kaj multnombraj aliaj kontribuoj (pli ol 500). Antaŭ nelonge (1979) aperis en Akademie-Verlag lia unua volumo de 6-voluma verko „Handbuch der Linguistik und Kommunikationswissenschaft" (Manlibro de lingvistiko kaj komunikada scienco), kiu traktas la lingvon, ties ekeston kaj priskribas la pli ol 5000 lingvojn de la tero.

En sia prelego, kiu daŭris kun respondo al demandoj entute pli ol 2 horojn, li prezentis la plej novajn datojn kaj informojn pri la internacia surtera lingvosituacio, ties evolutendencojn kaj problemojn kaj pledis tre imprese por la solvo de la lingvoproblemo helpe de planlingvo. Ĉi-rilate profesoro Meier alte aprezis la strukturajn ecojn de Esperanto kaj la ĝisnunajn praktikajn atingojn de la lingvo. La prelego estis akompanata de multaj mapoj kaj tabeloj. La redakcio de „der esperantist" esperas prezenti en formo de serio la ĉefan enhavon de tiu unika prelego.

CLE plue traktis problemojn de la elektoj sur subdistrikta ebeno, diskutis la kadrojn por la laborplanoj 1981 kaj aŭskultis diversajn raportojn.

*

**Honorinsigno de CLE**

Dum la 11a plenkunsido de CLE, la 13an de junio 1980 en Magdeburg estis distingitaj per la Honorinsigno de CLE:

- profesoro d-ro Viktor Falkenhahn
- d-ro Till Dahlenburg
- Werner Pfennig.

*Detlev Blanke*

# Informado kaj argumentado I

0. **La strukturo de la studo**
1. **Bone informi kaj argumenti**
1.1. La temo
1.2. Informi, propagandi, reklami, varbi, argumenti, agiti
1.3. Literaturo pri la temo
1.4. Frostavallen
2. **La scio pri la temo**
2.1. 11 kaŭzoj por skeptikeco
2.2. Pri terminoj
2.3. Ni sciu pri la temo!
2.4. De kie la scion?
2.5. Konservi la scion
3. **La informanto kaj lia partnero**
3.1. Kelkaj principoj
3.2. Diskutpartneroj, iliaj ĉefaj interesoj kaj argumentoj
3.2.1. La gejunuloj
3.2.2. La filologo
3.2.3. La natursciencisto
3.2.4. La politikulo
3.2.5. La „mezulo“
4. **Kelkaj ĉefaj argumentoj**
4.1. Argumentoj pri la signifo de planlingvo
4.2. Argumentoj pri la ecoj de la planlingvo
4.3. Šajnargumentoj
5. **Finvorto**

## 1. Bone informi kaj argumenti

### 1.1. La temo

Tiom longe kiam la parolantaro de Esperanto, ĉu organizite ĉu individue, klopodadas gajni amikojn por sia idealo, ekzistas la problemo kiel pleje sukcesi en tio. Ne malmulte la sukceso dependas de la maniero de informado kaj de la kvalito de argumentoj.

Jam multo estis skribita pri varbado, propagando, informado, pri argumentoj kaj kontraŭargumentoj, do ĉio ĉi, kio estas difinebla kiel „publika agado“. Oni do povus supozi, ke ne plu eblas ion novan aldoni. Tamen oni konsciu, ke la metodoj kaj la enhavo de la publika agado tra la jardekoj ŝanĝiĝis, ke krome elkreskas ĉiam novaj generacioj de publikaj agantoj en la Esperanto-movado, kiuj ne havis aliron al la diversaj materialoj. Kaj kompreneble ankaŭ ekzistas sufiĉe malsamaj opinioj pri tio, kiel plej efike varbi, propagandi, argumentadi . . . Ne laste la rezultoj en interlingvistiko kaj esperantologio, la konsidero de la ekkonoj el psikologio, lingvistiko, komunikada scienco, informadiko kaj aliaj sciencaj branĉoj influas (aŭ almenaŭ devus influi) la formon kaj enhavon de tiu publika agado. Oni ankaŭ devas krome konsideri, ke en la internacia Esperanto-movado mem ne nepre regas unueco pri celoj kaj pri la vojoj atingi ilin. Ekzemple por UEA de primara signifo estas la disvastigo kaj uzigo de Esperanto kiel sendiskriminacia internacia lingvo. Por MEM ĉefe temas pri apliko de Esperanto en la pacbatalo. Kaj – por preni ekstremon, adeptoj de Sennaciismo kurioze opinias, ke por justa mondordo necesas forigi la naciojn kaj ties lingvojn kaj akceptigi Esperanton al la mondo, tiel kreante iun iuspecan tutmondan „socialismon“. Do tiuj diversaj konceptoj pri la perspektivo aŭ aktuala rolo de Esperanto sendube influas la enhavon kaj manieron de informado, argumentado, varbado. Krom tio tre forte la konkretaj sociaj kondiĉoj, sub kiuj agadas la adeptoj

de Esperanto, influas la publikan agadon. En multaj socialismaj landoj, kie la Esperanto-movado jam pli malpli estas integrita en la socion kaj rigardata kiel utila kulturpolitika faktoro, la informado pri Esperanto certe havas aliajn akcentojn ol en nesocialismaj landoj, kie la Esperanto-movado havas pli malaltan gradon de socia rekoniteco kaj kie, cetere, la reklamo ludas grandegan rolon. Do, tute klare, ne eblas doni receptojn aŭ konsilojn kiuj ĉie havus la saman valoron.

Ni uzis sendistinge la nociojn „informi, varbi, propagandi, reklami, argumenti". Tamen, ekzistas gravaj diferencoj. Kaj en ĉi tiu kontribuo ĉefe temos pri problemoj de *informado* kaj *argumentado* kaj malpli pri la aliaj nocioj.

### 1.2. Informi, propagandi, reklami, varbi, argumenti, agiti

Laŭ „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (PIV), *informi* signifas „Doni al iu sciigojn aŭ klarigojn pri io de li ankoraŭ ne konata" (427). Sekve „informo" estas „io, pri kio oni informas". Do, tute sobraj difinoj. Ĉe la verbo *informi* PIV atentigas pri similsencaj vortoj kiel *sciigi konigi, akiri, anonci.*

Tute apude de informado oni trovas la koncepton de *propagando.* Ĝi jam enhavas aldonan specife aktivan signifero n: „Klopodado por disvastigi ideon" (PIV 876). Sekve propagandi estas „fari propagandon por . . ." kaj tie PIV donas kiel sencoparencajn verbojn „vastigi, semi, konverti, varbi".

Vorto proksima al „propagandi" estas „agiti": „Varbi por politika, sociala, religia kaj simila celo, iniciante la sentojn" (PIV 15). Ĉe agiti ni trovas atentigojn je „propagandi, polemiki, kampanjo".

Nocio el la komerca sfero estas „reklamo". Laŭ PIV „reklamo" estas „Alvoko al la publiko per ĉiuspecaj rimedoj por laŭdi kaj rekomendi komercaĵon, entreprenon aŭ ian aferon" (PIV 912). Ni trovas ĉe la ago fari reklamon (= reklami) ankaŭ la vortojn „anonci", „rekomendi".

„Reklamo" kaj „propagando" havas pli forte signiferojn de aktiveco, ŝanĝemo. En la nocio „varbi" tio eĉ pli forte videblas: „fari per siaj instigoj, ke iu aniĝu al grupo, partio, doktrino" (PIV 1168). Do, oni volas konvinki, konverti, gajni homon por io.

Distingiĝas en tiu grupo la nocio „argumenti" „prezenti argumentojn, provi demonstri per argumentoj" (PIV 65). Kaj „argumento", ni ekscias, estas „rezona pruvo, prezentata en diskuto".

(rezoni = „logike kunmeti argumentojn kaj tiri el ili konkludojn" (PIV 925).

Gravas ĉe „rezoni" la atentigo en PIV pri la vortoj „demonstri, pruvi, racio"; kaj ĉe „argumenti" ni trovas „diskuti, rezoni". La komparo de la signifoj kaj sencoj de la ĵus prezentitaj nocioj montras, ke plej nealtrudaj, sobraj kaj „seriozaj" estas la nocioj *informi — argumenti.*

Ne ĉiu ŝatas, ke oni propagandas, reklamas aŭ varbas por Esperanto kvazaŭ por varo, ĉar oni konceptas iom da altrudo, da enmikso en sian personan volregionon. *Informado* estas pli senaltruda, kaj *argumentado* estas ligita al sobra logiko.

Certe la vortoj por unuopaj homoj kaj en konkretaj kuntekstoj (frazo, teksto, situacio) alprenas diversajn kromsignifojn kaj sencojn. En la politika lingvaĵo agitado kaj propagando ekzemple ne nepre devas havi negative altrudajn signifojn. Ankaŭ varbado ja estas tute normala kaj eĉ necesa fenomeno en la Esperanto-movado.

Ni opinias, ke sukcesa informado kaj inteligenta argumentado estas efika varbado. Bona argumento entenas logike ordigitajn informojn. Ofte informo mem efikas kiel argumento.
Estas kompreneble, ke dum jardekoj la signifo de la menciitaj vortoj ŝanĝiĝas.
En „Germana Esperantisto" el la jaro 1919 [1 A (263), p. 1-2] ekzemple oni trovas interesan kaj multrilate ankoraŭ aktualan artikolon pri „propagando" („Iom pri propagando") de Seeberger. Por li kongresanoj, kiel „aro da seriozaj homoj portantaj la verdan stelon" faras bonan impreson, ili faras *propagandon.* (p. 1) *„Sed se ĉiu de tiuj kongresanoj ornamas la tutan ĉapelon per verdaj flagetoj, se el ĉiu butontruo elrigardas la Majstro, ke se ili brakenbrake kantas kanzonojn sur la strato. . ."* (p. 2). Tiam tio estis malakceptenda *reklamo.* Hodiaŭ certe ambaŭ ekzemploj efikus tute negative kiel „kontraŭpropagando". Aliloke Seeberger substrekas *„Por nia afero estas pli valore gajni unu influhavan personon ol dek homojn, kiuj ne havas klaran koncepton pri nia afero. Seriozajn, celklarajn homojn oni nur gajnas per seriozeco kaj celkonscio"* (p. 2).

### 1.3. Literaturo pri la temo

Pri tio, kiel plej efike gajni „seriozajn" kaj „celklarajn" homojn por Esperanto, oni jam multe skribis en Esperanto kaj en nacilingvoj. Oni trovas en la revuoj multajn spertoprezentojn, diskutojn kaj disputojn, kiel plej bone informi, varbi kaj argumenti. Menciindas artikoloserioj en la revuo „Esperanto" pri „efika informado",[1]) la „Manlibro de varbado"[2]), kiu adaptas la okcidentan reklamadon, kaj verkoj kaj studoj pri diversaj argumentoj kontraŭ Esperanto kun klarigoj kiel reagi[3]). En diversaj historiaj periodoj de la Esperanto-movado diversaj argumentoj aperis, pri kiuj oni devis reagi kaj kontraŭargumenti. Germanaj esperantistoj, membroj de la ĝis 1936 permesita (aŭ tolerita) Germana Esperanto-Asocio, eĉ devis klopodi senbazigi la „argumenton", ke „Esperanto estas unu el la helpiloj, per kiuj komunistoj kaj aliaj malamikoj kontraŭ popolo kaj patrio povas disvastigi siajn malbonajn instruojn tra la mondo"[4]) kaj ili ankaŭ devis kontraŭi la opinion, ke „Esperanto estas malakceptinda, ĉar elpensita de judo"[5]).
Ernest K. Drezen[6]), la gvidinto de la sovetunia Esperanto-movado, dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj konfrontiĝis kun argumentoj de seriozaj marksistoj, kiuj tamen, ĉar neakcepteblaj, postulis kontraŭargumentojn[6]). De aparta graveco estas argumentoj de sciencistoj, inter alie pro tio, ĉar la rolo de la scienco kaj ĝia reputacio (kaj tiel ankaŭ de la sciencisto) daŭre kreskadas.
Estas do valore legi analizojn de lingvistoj, ekzemple de O. Jespersen[7]), E. Wüster[8]), A. Bausani[9]) kaj de aliaj.
Ankaŭ diversaj nacilingvaj informmaterialoj[10]) kaj verkoj pri metodiko de la Esperanto-instruado[11]) entenas interesan materialon.

### 1.4. Frostavallen

UEA jam meze de la 50aj jaroj ekkonsciis pri la neceso, plialtigi la nivelon de la informa agado. La 30an de julio 1956 en sveda urbo Frostavallen kunvenis reprezentantoj de la Informaj Fakoj de UEA kaj akceptis rekomendaron, kiu konatiĝis kiel „Principaro de Frostavallen". „La Fundamenta Principaro de informado pri la Internacia Lingvo". En tiu principaro de aktuala intereso i. a. restis la ĉapitro VI." *Kvalito. Ĉefaj eraroj:*

*a) Nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k. s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ La Internacia Lingvo aŭ Esperanto;*
*b) superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo;*
*c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili;*
*d) uzi en nacilingvaj tekstoj esperantajn esprimojn, ekz. „samideano", „Majstro", „verdstelanoj" k. s.;*
*e) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo;*
*f) nomadi la informadon pri Esperanto „propagando";*
*g) doni al la Esperanto-Movado sektecan karakteron (tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k. s.). La eraroj en la informado malproksimigas de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitiĝon de la movado en multaj medioj.*

Certe valorus rediskuti la tutan dokumenton, ĉar pasis ne malpli ol 25 jaroj! Ekzemple enradikiĝas pli kaj pli la termino „internacia planlingvo Esperanto". Krome ŝajne oni ne devas nepre eviti, mencii aliajn projektojn. Iom informitaj homoj ja scias, ke ili ekzistas. Nepre plu validas plene la punktoj c) — g). Oni povus eĉ plivastigi tiujn punktojn aldonante novajn. (ekz. pri la malutilo bojkoti nacian lingvon, kontraŭi ties lernadon k. t. p.). Ankaŭ diskutoj pri la temo de tempo al tempo okazas dum la Universalaj Kongresoj.
En la jaro 1976, en la programo de la 61a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno ekzemple troviĝis aranĝo pri la temo „Kiel nun tempe argumenti por Esperanto?" Rezulte de la gviditaj debatoj oni akceptis la kongresan rezolucion 3 kun jena enhavo: *„La 61a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1976, diskutis kiel „internan" ĉeftemon la demandon „Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?" Ĝi notis, ke antaŭ ĝuste dudek jaroj, la 30an de julio 1956, reprezentantoj de la Informaj Fakoj de UEA, en kunveno en Frostavallen, Svedujo, akceptis Fundamentan Principaron de Informado pri la Internacia Lingvo kiu fariĝis ŝlosila dokumento en la informaj metodoj de UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale. Tiu Principaro de Frostavallen, kiu enkondukis novan periodon en la Esperanto-informado kaj unuafoje kodigis la plej gravajn principojn, restas aktuala ankoraŭ hodiaŭ.*
*La Kongreso rekomendas al la Esperanto-organizoj je ĉiuj niveloj, kaj al la unuopaj parolantoj de Esperanto, daŭrajn evoluigon kaj aplikon de modernaj kaj trafaj metodoj de informado kaj regulan interŝanĝon de materialoj kaj ideoj sur tiu kampo."*

*(„Esperanto" 9/1976, p. 146)*

Sendube ankaŭ dum aliaj internaciaj aranĝoj aŭ naciaj esperantistaj renkontiĝoj (ekzemple dum la seminarioj por kursgvidantoj ekde 1965 ĉiujare okazigitaj de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR) oni pritraktis la problemon de taŭga informado pri/respektive argumentado por Esperanto.

**Notoj**

1) I. Lapenna: Por pli efika informado, Revuo Esperanto, Rotterdam, **1971:** 1 — 8, **1972:** 2, 4 — 8, 10, **1973:** 4 — 5, ankaŭ samtitole kiel aparta broŝuro Rotterdam 1974, 22 p.
2) — G. Conrad/W. Walther: Manlibro de varbado, München 1974
— 2-a plene reverkita eldono: „Dua manlibro de varbado", München 1977

3) — W. Francini: Esperanto sen antaŭjuĝoj / Objektiva analizo de la ĉefaj kritikoj kontraŭ la Internacia Lingvo /, Rio de Janeiro 1978
— D. Blanke: Kelkaj konsideroj pri argumentado kaj argumentoj, „Paco" 4/1971 (GDR-eldono)
— L. Schödl: Argumentoj por kaj kontraŭ Esperanto, „der esperantist" n-ro 52 (marto-aprilo 1972)
— C. Fighiera: Antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, „Heroldo de Esperanto", Bruselo, marto 1962
— A. Bormann: Argumentado por la interlingvo en: „Interlingvistika Informa Servo", Reinbeck, 2/1976, p. 14 — 17
4) F. Kramer: Gegen Esperanto, Ein Dutzend Gründe, en: „Der Deutsche Esperantist", Dresden, 7-8/1935
5) F. Kramer: loko citita
6) Vidu E. Drezen: Dialektika razvitija jazyka, protivniki esperanto, en: Meždunarodnyi jazyk, Moskva, 6/1931, p. 247 — 252
7) Vidu O. Jespersen: Eine internationale Sprache, Heidelberg 1928
8) Vidu E. Wüster: Internationale Sprachnormung, Bonn 1966
9) Vidu A. Bausani: Geheim- und Universalsprachen, Stuttgart 1970
10) ekz. — H. Göhl: Esperanto, Eine Kulturforderung und ihre Erfüllung, Leipzig 1914
— J. Kreutzer: Esperanto — ein Kulturgut? Sein Wesen und Wert im Feuer der Kritik, Köln 1929
11) — R. Rakuša: Metodiko de la Esperanto-instruado, Ljubljana 1970, p. 14 — 24
— A. Sekelj: Informado I — VI en Kajeroj de Jugoslavia Esperanto-Instituto, Beograd, 6 (junio 1964) — 11 (oktobro 1965)
— T. Dahlenburg: Begleitmaterial zum Selbstunterricht, Berlin (Zentraler Arbeitskreis Esperanto) 1979

# Eĉ tio okazis

**Daŭra atendejo**
Kiel ŝerco rigardis la polico de Mons-en-Baroeul (Francio) telefonalvokon de viro, kiu asertis esti enŝlosita en dentista atendejo. Nur post insista petado de la alvokanto policistoj veturis al la indikata loko. Kaj fakte la dentisto estis forgesinta sian lastan klienton en la atendejo kaj estis irinta hejmen.

**Galimatio**
La usona federacia ŝtato New York akceptis „leĝon pri la deviga apliko de ĝenerale komprenebla lingvo en oficejaj publikaĵoj". Oni ne povis malhelpi tiun paŝon, ĉar la lingvo de la financaj dokumentoj fariĝis nekomprenebla. La nova leĝo postulas de bankoj kaj aliaj financaj institucioj uzi klarajn kaj kompreneblajn esprimojn. Alikaze povas esti aljuĝitaj monpunoj.

**Maratona marŝinto**
Virino el Doneck (Sovetunio) trovis erinacon kiu havis vunditan kruron. Ŝi flegis ĝiń sana kaj donacis ĝin al nepino en Dimitrov. Sed tie la pikila besto evidente ne bonfartis kaj rifuzis nutraĵojn, tiel ke oni fine donis al ĝi la liberecon. Post du monatoj aperis la migrema erinaco denove proksime de sia pli frua hejmo. Dum tiuj ok semajnoj ĝi marŝis ĉ. 70 kilometrojn.

**Nokta matĉo**
Enloĝanto de unufamilia domo en Bloomington (Minnesota, Usono) travivis noktan batalon kontraŭ svarmo de vespertoj, kiu verŝajne tra la kameno estis enpenetrinta la hejmon. Fajrobrigado, polico kaj parazit-eksterministo rifuzis helpon. Fine la viro armis sin per tenisbatilo kaj post sufiĉe longa batalo forpelis la furioze ĉirkaŭflirtantajn bestojn per fortoplenaj batoj. Lia edzino dume estis sinkaŝinta sub la litkovraĵo kaj direktis de tie la batalon. *(Trad. L. Knöschke)*

# II-a konferenco de Esperanto-medicinistoj

De 1980 — 06 — 06/08 la fakrondo de medicinistoj-esperantistoj de GDR okazigis sian IIan konferencon en Karl-Marx-Stadt. Dum du tagoj kunvenis 50 medicinistoj, kiuj reprezentas preskaŭ ĉiujn fakojn kaj profesiojn de medicino por labori, interŝanĝi spertojn kaj ankaŭ distri sin per altkvalita faka programo. La grandanima helpo de esperantistoj el Karl-Marx-Stadt kaj precipe de *s-ino Hempel,* kunlaborantino de distrikta estraro de Kulturligo, ebligis al ĉiuj partoprenintoj valorajn kaj impresoplenajn travivaĵojn en digna ejo de la klubo de Kulturligo „Pablo Neruda". Dankon al ili.

Komenciĝis la konferenco vespere de la 6a per interesa lumbildprelego pri Esperanto-filatelo fare de *s-ro Burmeister,* kiu ankaŭ kaptis pro sia kvalito la atenton de ne-filatelistoj; sekvis personaj interparoloj ankaŭ kun niaj gastoj el Hungario *(s-ro Keller,* biologo), Pollando *(d-ro Laba,* kirurgo) kaj Ĉeĥoslovakio *(d-ro Ĥradil,* ĝenerala medicinisto kaj eldonisto de „Sano"), kaj pridiskuto de la laborprogramo.

Post oficialaj salutvortoj de *k-do Heinel,* membro de la DLE Karl-Marx-Stadt, kaj laŭtlego de saluttelegramoj i. a. el Japanio komenciĝis la prelegserio, kiun ankaŭ partoprenis la sekretario de CLE ĉe Kulturligo, d-ro Blanke. La ĉeestintoj aŭskultis 12 diverstemajn, plejparte altkvalitajn prelegojn, kiuj tuŝis multajn flankojn de nia komuna laboro por la sano de la homoj. Prelegis niaj alilandaj gastoj kaj membroj de la fakrondo pri variaj temoj, kiuj ofte donis okazon al vigla diskuto.

Konkludoj:

— La grandskalo kaj la bona nivelo de la prelegoj kaj diskutoj pliriĉigis la konojn de ĉiuj partoprenintoj.
— Estis granda avantaĝo, ke reprezentantoj de multaj fakoj el entute kvar landoj kunsidis. Rara afero, ĉar plej ofte iuspecaj fakuloj nur diskutas inter si mem, kaj laŭ mia opinio utila flankefiko de komuna lingvo Esperanto.
— La ununura konferenclingvo estis Esperanto, kaj la kresko de la lingvonivelo dum du jaroj senteblis.

Sperta urbgvidado — en Esperanto — altnivela distra vespero kun amatoraj kaj profesiaj artistoj el Karl-Marx-Stadt impresis forte kaj la ne-esperantistajn klubmembrojn kaj la konferencanojn. (Menciinda: majstra interpreto de „Moritato de Mackie Messer" en la internacia lingvo)

Dimanĉa ekskurso al urbo Freiberg kaj vizito de la fama katedralo kun malgranda orgenkoncerto sur la fama instrumento de Silbermann finis tiujn impresoriĉajn kaj fruktodonajn tagojn.

*Helmer Koch, fakkuracisto pri*
*ĝenerala medicino*

*

**Bacilisto**

Survoje al la polikliniko „Zamenhofstrato" je la rando de Dresdeno (por pendigi portreton de Z. tie) mi demandis pasantinon: Pardonu — ĉu vi scias, kie estas la Zamenhofstrato? Ho jes, ŝi respondis, mi ja loĝas tie — mi gvidos vin ...

Dum la babilado mi demandis: Kio aŭ kiu estas „Zamenhof"? Ŝi: Nun, mi ie legis pri tio ... Zamenhof estis eminenta medicinisto. Li malkovris iun bacilon. *(E. Seidemann)*

# LEGU KA LERNU! - Lies und lerne! 4

*(Redaktas: Dieter Berndt)*

**Gajaj versoj** de Julio Baghy.
Julio Baghy (1891—1967) estis hungaro. Li verkis multajn simplajn versojn originale en Esperanto. Jen kelkaj el ili.

1. *Kun vizo kaj valizo*
   *vojaĝis al Parizo*
   *knabin' el Varsovi'.*
   *Vojaĝis mi kun ŝi.*

2. *Obstino de l' knabino*
   *jam ĉe la pola limo*
   *forlasis dece ŝin.*
   *Ni ridis ĝis Berlin'.*

3. *Dumvoje, ho tre ĝoje,*
   *ŝvitadis mi plurfoje*
   *sub ŝarĝo de l' valiz'*
   *helpante ĝis Pariz'.*

4. *Kaj tie tradicie*
   *ŝi dankis min gracie:*
   *„Ĉarmulo estis vi,*
   *ĉar — mulo estis vi."*

---

**Mia patro kaj mi**

*Drama aktoro estis mia patro ...*
*sortorompita, kara maljunul',*
*kiu, ludante rolojn en teatro,*
*larmojn elvokis ĉiam el-okul' ...*

*Drama aktoro estis mia patro, ...*
*Mi, obeema lia fila id',*
*por mi elektis rolojn en teatro*
*viŝi ĉi larmojn per — tutkora rid'.*

*En palaco kaj en budo*
*amo estas nur — ŝakludo;*
*post mispaŝoj, aventuroj*
*malaperas la — figuroj.*

---

**Klarigoj**

originale — original, ursprünglich
vizo — Visum
dece — schicklich, anständig
dumvoje — unterwegs (dum + vojo)
ŝviti — schwitzen
plurfoje — mehrmals (plur + foje)
ŝarĝo — Last
mulo — Maulesel (Beachten Sie das Wortspiel:
ĉarmulo — reizender Mensch
ĉar mulo — weil ein Esel)
sortorompita — vom Schicksal gebrochen (sorto + rompi) rompi = brechen
larmo — Träne
elvoki — hervorrufen (el + voki)
ido — Nachkomme (von der Nachsilbe —id)
viŝi — wischen
tutkora — von ganzem Herzen (tuta + koro)
budo — Bude
mispaŝo — Fehlschritt (mis-paŝo)
aventuro — Abenteuer
figuro — Figur

## Recenzoj

**Julius Fučik, Riporto skribita en la pendumila maŝo**

Trad. R. Hromada, reviz. kaj komplet. V. Novobilský kaj O. Kníchal.
Eld. Panoramo en Prago, 1979.

La nomo de Julius Fučik famiĝis tra la tuta mondo. Eĉ ekstere de CSSR oni nomis laŭ li stratojn kaj placojn (ekz. en Dresden). Promenante tra la parko de sia kvartalo la recenzinto — berlinano — preteriras lian monumenton kaj legas sur ĝi ĉeĥe, ruse kaj germane liajn emociajn vortojn „Homoj, mi vin amis, gardviglu!". En kio do estas la grando de tiu viro? Kiaj estas la kaŭzoj de lia famo? Kiu ne scias tion, tiu nepre legu lian faman „Riporton . . .", kiu nun fine aperis ankaŭ en Esperanto. En ĝi la leganto trovas — krom redaktaj informoj pri la persono, vivo kaj agado de Fučik — viglan, temperamentan kaj tamen precizan raporton pri liaj travivaĵoj en la GESTAPO-malliberejo, den Pankrác (Prago) printempe 1943, pri la cirkonstancoj de la arestado de li kaj de multaj el liaj kunbatalintoj kaj pri la konduto kaj sinteno de kunkaptitoj, gardistoj kaj naziaj funkciuloj. Sed krome kaj ĉefe, la leganto trovas homon de eksterordinara anima grando, homon, kiu malgraŭ la minacanta morto, malgraŭ torturoj kaj ĉiuspecaj malhelpaĵoj konservas sian homecon, konservas sian varman inklinon al la homoj kaj al la vivo, trovas eĉ la korpan kaj animan forton observi sian ĉirkaŭaĵon, memori pri homoj kaj okazintaĵoj ekster kaj en la malliberejo, trapensi koneksojn kaj homajn karakterojn kaj – helpe de riskopreta ĉeĥa gardisto – surpaperigi ĉion ĉi. La konatiĝo kun tia eksterordinara homo jam neprigas kaj pravigas la legadon de tiu „Riporto", ne parolante pri la faktoj donitaj en ĝi kaj per si mem historie kaj politike interesaj.

La impresita recenzinto deziras al la Esperanto-eldono de tiu elstara dokumenta verko varman akcepton flanke de la internacia esperantistaro, des pli, ĉar la tradukinto kaj reviziintoj prezentas ĝin en flua, facile legebla lingvaĵo. Havebla ĉe CLE, 7,80 M.

D-ro Karl Schulze

**Sandór Szathmári, KAIN KAJ ABEL**

Eldon. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1977, 287 p.

En la originala Esperanto-prozo, ĝis nun kvante kaj kvalite ne tro abunda, la verko de Sandór Szathmári okupas gravan, se ne la plej gravan lokon. Tio ŝuldiĝas ne nur al lia multe, diskutita utopia satira romano „Vojaĝo al Kazohinio" kaj al la rakontaro „Maŝinmondo", sed ankaŭ al multaj rakontoj, kiujn li publikigis dise en variaj Esperanto-revuoj (Norda Prismo, Monda Kulturo, Hungara Vivo) inter 1950 kaj 1972. Tiuj dissemitaj kaj tri ĝis nun ne publikigitaj prozaĵoj estas kunigitaj en ĉi tiu volumo, kiu portas la titolon de la ĉekape presita novelo. Entute en la volumo troviĝas 23 prozaĵoj de diferenca amplekso, kaj kvankam diferencas ankaŭ la nivelo, certe neniu el la rakontoj estigos enuon ĉe la leganto. Tiu ĉi trovos kelkajn pliajn sciencfikciaĵojn, kiuj iele memorigas pri „Vojaĝo al Kazohinio" kaj „Maŝinmondo", sed superpezas tekstoj de satireca, humura karaktero, en kiuj Szathmári mokas fenomenojn de la nuntempo, pensmanierojn kaj sintenojn de niatempaj homoj, kelkfoje en historia vestaĵo. Szathmári prezentas siajn direndaĵojn en flua, sprita stilo, kvankam ne sen kelkaj lingvaj stumbletoj. Krome kelkloke ĝenas preseraroj, kelkfoje eĉ sencperturbaj (ekz. kio estas sur paĝo 30 „enzugi" kaj ĉu „mordusto" sur paĝo 204 devas esti mordisto aŭ eĉ murdisto?); sed nek la stumbletoj nek la preseraroj malpliigas la plezuron de la legado, kiun la recenzinto rekomendas des pli insiste, ĉar ĉiuj rakontoj estas saturitaj per la spirito kaj celadoj de la lingvo internacia direktitaj al pli bona kaj pli vivinda vivo por la homoj. Finfine oni nepre devas atentigi pri la leginda postparolo, en kiu Vilmos Benczik, la redaktoro de la volumo, prezentas altnivelan pritakson de la tuta verkaro de Sandór Szathmári. Havebla ĉe Hungara Kulturcentro, Berlin.

D-ro Karl Schulze

**Poemkolekto**

Ankaŭ ĉijare ni estas regalataj per eldono de la jam bone konata kaj ŝatata eldonejo „Eesti Raamat" el Tallinn: „Al Abelujo ĝi flugas" de Juhan Liiv, poemkolekto, kiun elektis kaj tradukis Hilda Dresen. Post endukaj vortoj de d-ro Aarne Vinkel sekvas sur 146 p. ĉ. 120 poemoj kaj 25 t. n. „eroj" plejparte nur kelkliniaj. Temas pri naturpoezio, patrolanda poezio kaj persona sorto. Tra la versoj — ofte preskaŭ simple popolkantsimilaj — senteblas la melankolia, pasia kaj pensema animo de la poeto.

Minortone li prikantas la propran sorton kaj la amatan patrolandon, ekz. kiel en: „Zorgo", „Lasu min", „Vintra soleco de la poeto", „Ja ne ĉiu".

Pli serene, sed tamen ne optimisme, sonas la naturpoeziaĵoj: „Somera tago", „Mateno", „Maro", „Alproksimiĝo de printempo". El la 4 ilustraĵoj de Herold Eelma 2 substrekas la maĵorajn kaj 2 la minorajn sonojn de la lirikisto kaj novelisto Juhan Liiv (1864 — 1913), kiu estis siatempe „unu el la plej interesaj kaj tragikaj figuroj en la estona literaturo".

. . . Portadas boato
min jam al bord'·
mi scias, mi vidas,
jen mia sort' . . .

H. Sauerbrey

## Recenzoj

**Perdita ŝanco**

Ĉiu nova tradukita libro aperinta sur la Esperanto-merkato estas festo, ĝoja evento. Kun viva plezuro mi salutis ankaŭ la aperon de la nova rakonto „La perdita honoro de iu **Katarina Blum**"*, tradukita de **Rikardo Ŝulco** (tiel!). Aŭtoro de la rakonto estas la elstara progresema okcident-germana verkisto **Heinrich Böll** — la sola nomo inter la multaj, cetere kiun la tradukinto indulgis, ne kripliginte ĝin.

Ĉe la unua rigardo mi miksis la nomon „Ŝulco" kun la nomo de **d-ro Schulze**, bonfama tradukinto de la romano „Nuda inter lupoj", kiu aperis antaŭ kelke da jaroj en la Germana Demokratia Respubliko. Komencinte legi la vere intereskaptan rakonton, mi jam sur la unua paĝo kunpuŝiĝis kun frazo 12-linia — peza, laciga, maleleganta, kiu ne sonis esperante, sed jes germane.

Mi tamen konscience, sed pene legis la libron ĝis la fino. Mi konstatis, ke ĝi distingiĝas antaŭ ĉio per sia peza kaj nebona stilo. La mistradukon eble helpis la longaj frazoj, propraj al la germana lingvo. Rekordo pri longeco sendube gajnas la paĝoj 91 — 92: Dudek kvin-linia (preskaŭ unu-paĝa) frazo.

Signo pri mistraduko estas ankaŭ amasa uzado de verboformoj nekutimaj en bona Esperanto-teksto (ekz. sur p. 147: „Petro kompreneble sciis, kio en la ‚Ĵurnalo' estis aperadinta pri mi, li estis promesinta al mi . . ."), anstataŭ la kutima simpla, klasika kaj plene klara preterito aperis, promesis. Tiaj kaj similaj kunmetitaj verbotempoj, kiam ili ne estas nepre necesaj, ĝenas kaj faras la tekston peza, ne belsona, kelkfoje ne tuj komprenebla. Per unu vorto — tiel Esperanto ne sonas . . . Se oni relegus verkojn de niaj klasikuloj (Zamenhof, Kabe, Baghy, Kalocsay, Schwarz, Boulton k. a.), oni vidus, ke ili preskaŭ neniam uzis pezajn kombinojn kiel estas — inta anstataŭ estis. La tradukinto uzas strangajn vortojn kiel demandadita (anst. esplorita, pridemandita k. a.).

En la libro ne mankas gramatikaj eraroj allasitaj sub la influo de la germana lingvo (ekz. „. . . lin kortuŝis la ĉagreno de sia [anst. lia] amiko Blorno"). Aĥ, tiu ĉi sia stumbloŝtono, kiun germanaj samideanoj, ne bone lernintaj nian lingvon, uzas malkorekte, influate de sia gepatra lingvo!

Nekutime peze sonas vortoj kiel demandadistaro (p. 118); etega (tute eta, tre eta); Katarino pasis (anst. pasigis) la reston de la vespero . . . (p. 122); ŝi ankaŭ ne malatentis (preterlasis) informatigi (informi); li adiaŭis sin de ŝi (anst. li adiaŭis ŝin (p. 132); manko de akuzativo ĉe la edzino (p. 150).

Oni renkontas blindan imiton de vortetoj ne-ĝustalokaj kaj ne-ĝustasencaj en Esperanto: jen, nun, tiam.

Kaj jen kuriozaĵo: R. Ŝulco **tradukas** nomojn: Templano anst. Templer, Elzino anst. Else aŭ Elza, Eksgarantio anst. Haftex aŭ Hafteks. Li senescepte esperantigas ĉiujn famili- kaj urbonomojn: Hermanzo (Hermanns), Molotovo (Molotow), Ŝtrojblado (Sträubleder) k. m. a. Tiu praktiko aldone ŝarĝas la legadon de la traduko, kiu jam sen tio estas peza.

Esperanto ne estas ombro de lingvo, kiu ebligus al ĉiu ajn komencanto aŭ nespertulo fari lingvajn eksperimentojn. Esperanto estas tre belsona dum la jardekoj ellaborita lingvo; ĝi havas sian internan ritmon; fluas kiel monta torento; sonas kiel muziko. **Tradukado en Esperanton ne devas esti konfidata al personoj nekapablaj aŭ ne povantaj, flue, artoplene, belsone, klare traduki.** Eldono de tiu ĉi fuŝe tradukita libro levas gravajn demandojn. Temas ĉefe pri la selekto de bonaj, Esperanton regantaj kaj nepre talentaj tradukistoj. La eldonejo havas la devon anticipe plene certiĝi, ke la proponita tradukisto ne nur estas perfekta esperantisto, sed havas ankaŭ la kvalitojn, la talenton traduki. Tradukado de beletraĵoj estas arto parenca al verkado.

Per tradukoj kiel „Katarina Blum" oni mise reprezentas Esperanton mem. Ĝi estas ja bonega lingvo, taŭga por perfekta, brila tradukado, se ĝi trafas la manojn de majstro.

Ĉe okazoj kiel la mistraduko de „Katarina Blum" la morala perdo estas pli granda kaj pli grava ol la materiala.

Asen Grigorov, Sofio

* La perdita honoro de iu Katarina Blum, rakonto de Heinrich Böll, Eldonejo Edition Leipzig 1978. Tradukis el la germana lingvo Rikardo Ŝulco. P. 154

★

**Represo de valoraj libroj**

En la scienca eldonejo Georg Olms-Verlag Hildesheim/New York jam aperis du tre gravaj interlingvistikaj resp. esperantologiaj verkoj. 1973 aperis represo de la fama „Bibliografio de Internacia lingvo" de **Petr E. Stojan** kun bibliografia aldono de **Reinhard Haupenthal.** 1978 aperis de **Pierre Janton** „Einführung in die Esperantologie", la franca verko, tradukita de **Günther Becker** kaj **Maria Becker-Meisberger.**

1979 oni represis la klasikan verkon pri la historio de planlingvaj projektoj „Histoire de la langue universelle" (1907) kaj „Les neuvelles langues internationales" (1907) (en unu volumo), de **Louis Couturat** kaj **Leopold Leau.** En la jaro 1980 ankaŭ reeldoniĝis la unua lernolibro de Volapük: **Johann Martin Schleyer:** „Volapük. Die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache für alle Gebildeten der Erde. Kun bibliografio de **Reinhard Haupenthal.**"

## Laste aperis 1

*Per tiu ĉi rubriko ni regule informos pri la plej gravaj eldonaĵoj, kiuj aperas en aŭ pri Esperanto. La listigo de iu verko ne signifas iun ajn valorprijuĝon.*

— **Ĉu vi konas Bulgarion?** Roman Dekov/Genadi Georgiev. trad. Ivan Keremedĉiev-Esperov. Sofia-Preso, 1978, 48 p.
— **Kato en la sako.** Red. V. Benczik, Budapest. Tankönyvkiadó 1978, 133 p. 18 noveloj kaj poemoj.
— **Skota antologio.** Glasgow. Kardo. 1978, 255 + 13 p.
— **Astronomia foto-atlaso.** A. Heck/J. Manfred, Liège: Editions Desoer S. A. 1978, 224 p. Pli ol 100 fotoj (nigra-blankaj) kun klarigo en la angla, franca, germana, hispana kaj Esperanto.
— **Laŭokazaj lingvaj notoj.** Avo (Alec Venture), London: Brita Esperanto-Asocio, 1977, 85 p.
— **Skizo pri la Esperanto-movado en Pollando.** Andrzej Pettyn, Varsovio. Pola Esperanto-Asocio, 1978, 13 p.
— **Tra dezerto kaj praarbaro.** Henryk Sienkiewicz. Trad. M. Mieczyslaw Sygnarski. Varsovio, Interpress 1978, 315 p.
— **Esperantologiaj studoj.** Eugen Wüster, Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1972, 254 p.
— **Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.** John Wells. Rotterdam: UEA/CED, 1978, 76 p.
— **Esperanto sen antaŭjuĝoj.** Walter Francini, Rio de Janeiro/San Paŭla Esperanto-Asocio, 1978, 208 p.
— **Ĉu li bremsis sufiĉe?** Johán Valano. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978, 128 p. romano.
— **La nova butikisto de Nukugaia kaj aliaj noveloj.** Bertram Potts. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978, 250 p. Leĝeraj amuzaj noveloj
— **Cviĉebnice Esperanta.** Theodor Kilian, Praha: Státni Pedagogickí Nakladelstvi 1978, 270 p. Lernolibro por ĉeĥoj.
— **Esperanto and the Universal Esperanto-Association.** Rotterdam, UEA, 1977, 7 p. (Esperanto-Dokumentoj n-ro 12, angla serio)
— **Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?** Claude Piron. Rotterdam, UEA, 1977, 32 p. (Esperanto-Dokumentoj 10, Esperanta serio)
— **Espéranto et écoles eŭropéenes.** Hubert X L. Drabs. Rôtterdam, UEA, 1977, 15 p. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 1, franca-serio)
— **Esperanto kaj la pliaĝuloj.** Ilona Gál. Rotterdam, UEA, 1977, 23 p. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 9, Esperanta serio)
— **Frithjof-sagao.** Esaias Tegnér. El la sveda trad. W. T. Oeste. Ascolino Piceno: Gabrielli, 1976. 207 p. Eposo.
— **Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto.** Tyburcjucz Tyblewski. Rotterdam, UEA, 1977, 8 p. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 6, Esperanta serio)
— **Language and the right to communicate.** A-M. M'Bow, R. L. Harry, A. Isaksson, L. R. Sussman, H. Tonkin. Rotterdam, UEA, 1978. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 13, angla serio)
— **Libro de amo.** Peter Peneter/George Peterido Peneter. Byblos, 1979, Erotikaj poemoj.
— **La lingva problemo en la Ŭropa Komunumaro.** Werner Bormann. Rotterdam, UEA, 1977, 8 p. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 8, Esperanta serio)
— **Pri lingvo kaj aliaj artoj.** William Auld. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978, 216 p. literaturteoriaj eseoj.
— **Les Problèmes linguistiques et l'Acte Final.** Rotterdam, UEA, 1978, 12 p. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 3, franca serio)
— **La Revizoro,** N. V. Gogol. El la rusa trad. L. L. Zamenhof. Oosaka-Japana Esperanta Librokooperativo, 1978, 99 p.
— **Strečita Kordo.** K. Kalocsay. Saarbrücken, Artur E. Iltis, 1978, 196 p.
— **Praktika Bildvortaro de Esperanto.** Oxford University Press, 1979, 96 p. 2000 vortoj en Esperanto, ilustritaj per koloraj bildoj.
— **Brand.** Henrik Ibsen. El la norvega trad. E. A. Haugen, Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978, 320 p.
— **Aniaro.** Harry Martinson. El la sveda trad. William Auld/Bertil Nilsson. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1979, 174 p. Ĉefverko de nobelpremiito.
— **Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto.** William Auld, Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979, 101 p.
— **L'Espéranto.** Pierre Janton. Paris: Presses Universitaires de France, 1977 128 p.
— **Kolbe: La dia avarulo.** Jan Dobraczýnski. El la pola trad. B. Monkiewicz. Ascoli Piceno Gabrielli, 1979, 185 p.

**Für das Archiv des ZAK**

Der Zentrale Arbeitskreis Esperanto kauft laufend Esperanto-Bücher und alte Zeitschriften für sein Archiv. Richten Sie bitte Ihre Angebote an den Zentralen Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60.

**Erfahrungen im Ausland**

In Polen, der ČSSR, Ungarn und Bulgarien finden alljährlich interessante internationale Veranstaltungen statt, an denen auch Esperantisten aus der DDR teilnehmen.
Wie die Erfahrungen zeigen, ist es nicht immer für jeden Interessenten einfach, z. T. auf Grund ungenügender Reiseinformationen, das Reiseziel ohne große technische Schwierigkeiten zu erreichen. Der Zentrale Arbeitskreis Esperanto ist daher bereit, als Informationsvermittler zu wirken. Alle Bundesfreunde, die an einer Veranstaltung teilnehmen möchten (z. B. Lanĉov/ČSSR), informieren darüber das Büro (1080 Berlin, Charlottenstraße 60), das zwischen diesen Interessenten den Informationskontakt herstellt. Möglicherweise könnte auf diese Weise eine Reisegruppe entstehen, die informiert und etwas vorbereitet ihr Ziel gut und sicher erreicht. Es muß aber hervorgehoben werden, daß der Zentrale Arbeitskreis außer der Information und Koordinierung keine weiteren Dienstleistungen (z. B. Geldüberweisungen u. ä.) übernehmen kann. Sollte ein(e) erfahrene(r) Bundesfreund (in), der/die die einzelnen Veranstaltungen gut kennt, sich bereit finden, jeweils die Koordinierung zu übernehmen, so möge er/sie sich ebenfalls beim Zentralen Arbeitskreis melden.

**Rezolucio por Esperanto ĉe MFAUN**

La, en la antaŭa numero anoncita, unua paŝo de kunlaboro farita inter UEA kaj la Federo de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj (MFAUN) donis jam burĝonon intertempe.

La 27a plena asembleo de la Federo de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj (MFAUN), kiu okazis en la 1979a oktobro 8—13 en Barcelono, akceptis la rezolucion pri Esperanto. Ĝi tekstas jene:

La 27a Plena Asembleo de M. F. A. U. N.

1. bonvenigas la kontaktadon faratan de la prezidanto kaj ĝenerala sekretario kun Universala Esperanto-Asocio;
2. rekonas, ke la komuna internaciismo de membroj de Esperanto-asocioj kaj la Asocioj pri Unuiĝinta Naciaro estas bazo por estonta kunlaborado;
3. invitas ĉiujn UN-Asociojn kunlabori kun Esperanto-asocioj por instigi edukajn instancojn kaj organizojn en iliaj landoj, enkonduki aŭ plivastigi la instruadon de Esperanto.

(Un kaj ni, 16)

**Distriktaj Informiloj — gravaj por informado**

Kelkaj Distriktaj Laborrondoj Esperanto (DLE) eldonas periodajn informilojn. Tiu, kiu aperadas plej longe, evidente estas la „Baltmara Informilo", redaktata de Werner Plate el Rostock. Septembre 1979 jam aperis n-ro 133.
La DLE-oj Leipzig kaj Halle eldonas la bele presitan „Komunan Esperantan Informilon", kiu 1979 atingis sian 26an numeron. Ĝin redaktas Jürgen Hamann. Antaŭ nelonge reaperis la „Turingia Informilo", komuna informilo de la DLE-oj Erfurt, Suhl kaj Gera. Redaktoro estas Hans-Jürg Kelpin. Tre utilan rolon ankaŭ ludas la regulaj informiloj eldonataj de DLE Neubrandenburg „Panoramo" (redaktas Werner Pfennig), DLE Potsdam „Esperanto-informoj" (redaktas Karl Müller/Hanna Scheffs) kaj DLE Schwerin (redaktas Hans Diedrich). Iam aperis informiloj ankaŭ ĉe la DLE-oj Berlin, Magdeburg kaj Frankfurt/Oder.
Tiuj kaj similaj informiloj, ĉu modeste aŭ pli lukse faritaj, ludas tre gravan rolon por la informado de la unuopa esperantisto.

---

— **Language and international communication: The right to communicate.** Humphrey Tonkin, Rotterdam: UEA 1979, 12 p. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 15, angla serio)
— **Makedonaj popolaj rakontoj.** Red. J. Velebil. Zagreb: Internacia Kultura servo, 1978, 144 p.
— **Retoj.** Lorjak. Helsinki: Fondumo Esperanto 1978, 207 p., romano
— **Esperanto-makedona vortaro kaj makedona-Esperanta vortaro, kun konciza gramatiko.** M. Gabski/G. Pop-Atanasov. Prilap: Esperanto-Societo „La Progreso" 1977, 283 p.
— **Antologio de argentinaj noveloj.** Red. Bastono de Kordobo. Diamanto: Argentina Esperanto-Muzikeldonejo. 1979, 200 p.
— **Apontamentos de Esperanto.** A. S. Almeida Lisbono: Portugala Esperanto-Asocio, 1978, 287. p. Lernolibro
— **Elektitaj fabloj de Krilov.** El la rusa S. G. Rublov. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979, 336 p.
— **Granda galerio Zamenhofa 2.** Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto 1978, 419 p. Fotoj de L. L. Zamenhof, liaj familianoj, monumentoj k. t. p.

# INFORMOJ EL GDR

## Nova scienca libro

Centra Laborrondo Esperanto eldonis antologion de sciencaj studoj sub la titolo „La internacia lingvo: sciencaj aspektoj". La 235-paĝa verko estas redaktita de Detlev Blanke kaj entenas plejparte prelegomaterialojn de la internacia scienca seminario „Sciencaj aspektoj de Esperanto", kiu okazis de 17a ĝis 23a de aprilo 1978 en Ahrenshoop. Krome eniris diversaj aliaj studoj. La libro dividiĝas en 4 partojn.

Post la ampleksa **enkonduko** (7 paĝoj) en la **I-a parto „Internacia lingva komunikado kaj interlingvistiko"** oni trovas jenajn kontribuojn:

**Árpád Rátkai:** Klasika sistemo de la internacia lingvouzo
**Árpád Rátkai:** Problemoj de la movadhistoriaj esploroj
**Detlev Blanke:** La lingvoscienco kaj planlingvoj
**Detlev Blanke:** Interlingvistiko kaj eksterlingvistikaj esploroj
**Jerzy Leyk:** Sociologio de la lingvo, socilingvistiko, interlingvistiko
**Jaromír Jermář:** Etnaj problemoj kaj interlingvistiko
**István Szerdahelyi:** Interlingvistiko en Hungario (resumo)
**Boris Kolker:** Interlingvistiko kaj interlingvistikaj esploroj en Sovetunio
**Marinko Gjivoje:** Jugoslava kontribuo al interlingvistiko
**Vera Barandovska:** Latinidaj planlingvoj el la vidpunkto de latinisto
**Detlev Blanke:** Pazigrafioj
**Detlev Blanke:** La Esperanto-movado kaj sciencaj esploroj, tezaj konstatoj kaj proponoj.

**Parto II: „Scienca priskribo de Esperanto"** entenas jenajn studojn:

**István Szerdahelyi:** Pri la lingvistika priskribo de Esperanto
**Detlev Blanke:** Kelkaj problemoj de la vortfarado de la germana lingvo kaj de Esperanto
**Detlev Blanke:** Motivado de la signifo de Esperantaj vortoj
**Jerzy Leyk:** Modelo de la Esperantaj leksoformoj
**Detlev Blanke:** Resumo de disertacio
**Stojan Ĝuĝev:** Enkonduko en la fonologion de Esperanto

En **Parto III „Scienca apliko de Esperanto"** ni trovas:

**Ottó Haszpra:** Spertoj kaj proponoj pri la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj
**Josef Kavka:** ISAE-aplikado de Esperanto
**Ludoviko Fritsch:** Teknikaj vortaroj en Esperanto – problemoj de la fakterminologio en Esperanto
**Marinko Gjivoje:** La forto kaj la sorto de la Esperanto-literaturo en tutmondaj bibliotekoj
**Ignac Florian Bociort:** Reflektiĝo de unuopaj kulturoj en esperant-lingvaj publikaĵoj
**István Szerdahelyi:** La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj
**Paul String:** Esperanto kiel objekto kaj instrumento de aŭtomata komputado
Kaj la **IVa parto** entenas kiel aldonaĵoj la komunikon pri la internacia seminario kaj adresaron de la kontribuintoj.
La libro kostas 9 markojn kaj estas por GDR-anoj ricevebla ĉe Centra Laborrondo Esperanto.

## Wörterbücher erhältlich

Der Zentrale Arbeitskreis Esperanto bietet in beschränktem Maße an Einzelbezieher die Wörterbücher Esperanto—Deutsch zum Preis von M 5,80 an.

## „Scienca Mondo"

Die bekannte Zeitschrift „Wissenschaftliche Welt", Organ der Weltföderation der Wissenschaftler (Sitz in London) erscheint in englischer, französischer, russischer, deutscher Ausgabe und in Esperanto. In vier Heften jährlich (pro Heft 34 S.) werden vielseitige wissenschaftliche und wissenschaftspolitische Fragen behandelt. Die Esperanto-Ausgabe (Chefredakteur Prof. V. Pejevski, Sofia), die auch des öfteren Beiträge über interlinguistische Fragen enthält, kann beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto (1080 Berlin, Charlottenstraße 60) für 1980 bezogen werden. Preis M 10,—. Wir empfehlen jedem wissenschaftlich und sprachlich interessierten Esperantisten den Bezug der Zeitschrift. Die Nummern der Jahre 1977, 1978 und 1979 sind noch lieferbar.

## „Juna Amiko"

Die Bezieher der Zeitschrift „Juna Amiko" werden festgestellt haben, daß ihnen die Nummern 16, 17 und 19 nicht geliefert wurden. Der ZAK hat diese bisher nicht ausgelieferten Ausgaben aus Ungarn erhalten und wird alle Bezieher beliefern.

## „Hungara Vivo"

Auf Grund eines technischen Versehens haben die Bezieher der Zeitschrift „Hungara Vivo" in der DDR die Nr. 6/78 nicht erhalten. Das Heft ist inzwischen im Büro des ZAK eingetroffen. Alle Abonnenten, die diese Nummer beim ZAK schriftlich anfordern (1080 Berlin, Charlottenstraße 60), erhalten das Heft kostenlos zugesandt.

**En Ruse/Bulgario**

De la 3a ĝis 9a de aprilo 1980 delegacio de Distrikta Laborrondo Esperanto Potsdam partoprenis la Printempan Amikec-Renkontiĝon Esperantistan en Ruse. La du delegitoj Hanna Scheffs kaj Helmut Krone havis multajn utilajn interparolojn kun la reprezentantoj de la klubo en Ruse pri kunlaboro.

**Tonbanddienst**

Wir weisen nochmals auf das Angebot des Tonbanddienstes des Zentralen Arbeitskreises hin, das in „der esperantist" 6/1979 (Nr. 98), S. 15, veröffentlicht wurde. Als Ergänzung ist zu notieren:

— Für **Programm Nr. 6** (Vortrag von Prof. **Bokarov)** kann auch der vollständige Text zur Verfügung gestellt werden.

Das Angebot wurde um weitere drei Programme vergrößert:

— **Programm Nr. 11** enthält Lieder und Chansons in Esperanto (politische Lieder, lyrische und satirische Chansons über Themen der Esperanto-Bewegung). Auch zu diesem Band wird ein Textmaterial geliefert.

— **Programm 12** enthält einen Vortrag von **Prof. Dr. Georg F. Meier,** Professor für Kommunikationswissenschaft an der Humboldt-Universität Berlin, Chefredakteur der „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung": „Aspekte der internationalen sprachlichen Kommunikation". Der Vortrag wurde auf der 11. Tagung des Zentralen Arbeitskreises Esperanto am 12. 6. 1980 in Magdeburg gehalten. Teil I auf Kassette Nr. 12. Um diesen Vortrag vollständig kopieren zu können, muß eine zweite Kassette (60 Min.) eingesandt werden. Außer Teil II des Vortrages von Prof. Meier enthält sie

— **Programm 13:** Dr. Renato Corsetti: „Sprachpolitik der Entwicklungsländer" (Lingva politiko de evolulandoj), 30-minütiger Vortrag, gehalten auf dem internationalen Seminar „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" vom 18.—24. November 1979 in Bad Saarow. (In Esperanto, sehr gute Tonqualität.)

Um die Kosten für die Erweiterung des Dienstes zu decken, wird für das Überspielen für ein Programm (nur auf 60-Min.-Kassetten) eine Gebühr von M 10,— erhoben. Sie ist zusammen mit der Bestellung und der leeren Kassette an den Leiter des Tonbanddienstes Klaus-Dieter Dungert, 3027 Magdeburg, Albin-Brandes-Straße 3, einzusenden.

## Jugendseminar

**Wie alljährlich, so führt die Jugendkommission des Zentralen Arbeitskreises Esperanto auch in diesem Jahr ihr traditionelles Jugendseminar durch.**
**Es findet vom 9.—13. 12. 1980 in Miersdorf bei Zeuthen direkt am Zeuthener See statt. Das Programm sieht Vorträge in und über Esperanto vor. Die Teilnahme am Seminar ist kostenlos. Freistellungen beantragt der Zentrale Arbeitskreis Esperanto.**
**Anmeldungen können bereits jetzt formlos an den Zentralen Arbeitskreis Esperanto (1080 Berlin, Charlottentsraße 60) gerichtet werden.**

## Intensivkursus in Potsdam

**Vom 12.—18. Oktober 1980 findet in Potsdam ein Intensivkursus für Esperantisten mit Grundkenntnissen statt. Er wird von der ungarischen Pädagogin Szuzsanna Barcsay geleitet und kostet 130 M. Täglich werden 5 — 6 Stunden Unterricht geboten. Das Rahmenprogramm sieht weiterhin Vorträge und Exkursionen vor. Interessenten, die über Esperanto-Grundkenntnisse (Durcharbeitung eines Lehrbuches) verfügen müssen, melden sich umgehend bei Hanna Scheffs, 1503 Potsdam-Bornstedt, Apfelweg 3. Für Anfänger ist der Lehrgang nicht geeignet.**

**Radio GDR**

Sabate, la 2an de februaro, inter la 8 : 35 kaj 9 : 35, la Leipzig-a stacio de Radio GDR elsendis interesan semajnfinan programon „pri kaj parte en Esperanto". La radio-ĵurnalistoj Jürgen Schulze kaj Ursula Minsel vizitis la laborprogramon kunvenon de Leipzig-a Laborrondo kaj intervjuis multajn partoprenantojn. Krom la voĉoj de Rolf Beau kaj Jürgen Hamann, prezidantoj de la Distrikta resp. Leipzig-a Laborrondoj Esperanto, ankaŭ tiuj de Elsa Gruhle, Gerda Herold, Beate Jagota, Ino Kolbe, Margarete Löwe kaj Margit kaj Manfred Kunze estis aŭdeblaj. Muzikajn erojn (de disko kaj kaseto) kontribuis Gianfranco Molle kaj Veselin Damjanov. La disaŭdigo, direktita al neesperantista publiko, enhavis ankaŭ premian demandon: temis pri la germana traduko de la Esperantaj vortoj „amo", „paco" kaj „amiko". Aldone al la suveniraj premioj de la radiostacio la ĝustaj solvintoj povis ankaŭ gajni Esperanto-lernolibron kaj senpagan viziton de Esperanto-kurso. Pli ol **ducent telefonalvokoj kaj poŝtkartoj** al la premia demando pruvas la grandan ĉhon inter la aŭskultantoj kaj havigis al la Distrikta Laborrondo multajn adresojn de interesiĝantoj pri Esperantokursoj.

### Interlingvistiko en Samarkando

La 9an — 21an de aprilo 1980 okazis la 39a Studenta Scienca Konferenco de Samarkanda Ŝtata Universitato je la nomo de Ališer Navoij, dediĉita al la glora 110jara naskiĝdatreveno de V. I. Lenin. Same kiel pasintjare en la kadroj de la konferenco funkciis aparta sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝin partoprenis studentoj de 6 superaj lernejoj de Samarkando kaj Taŝkento. Estis traktataj jenaj temoj:

1. Jermanova L.: Esperanto kiel lingvo de teatro (honorfolio de la fremdlingva fakultato de Samarkanda Ŝtata Universitato)
2. Ŝakarov A.: Sciencteknika revolucio kaj problemoj de multlingveco (la supre menciita honorfolio)
3. Hafizova H.: L. Zamenhof — lingvisto kaj kuracisto (la supre menciita honorfolio)
4. Tjutjunĝi Je.: La Granda Oktobro kaj Esperanto (la supre menciita honorfolio)
5. Fajzijev S.: Esperanto kiel propedeŭtika lingvo (la supre menciita honorfolio)
6. Hasanov R.: Sporta terminologio en Esperanto (la supre menciita honorfolio)
7. Abbosov M.: Problemoj de vortfarado en Esperanto (monpremio)
8. Hamrakulov Ŝ.: Strukturo de Esperanto kompare al naciaj lingvoj (honorfolio de la distrikta komitato de komsomolo)
9. Ionesov A.: Planlingva projekto Volapük (honorfolio de la regiona komitato de komsomolo)
10. Kim S.: L. N. Tolstoj kaj internacia lingvo
11. Balasjan Ĵ.: Lingvistika valoro de Esperanto
12. Nurijeva S.: La Brita skolo en Esperanto poezio
13. Šerman L.: Internacia lingvo kaj internacia edukado
14. Ibrasimova M.: Jura statuto de Esperanto-organizaĵoj
15. Anplejeva V.: Maksim Gorkij kaj Esperanto

Ĉiuj supre menciitaj prelegtitoloj troviĝas en la konferenca programo eldonita de Samarkanda Ŝtata Universitato.

Anatolo Ionesov

### Bulteno de ASE

Aperis jam n-ro 4 de la ruslingva informilo por la kluboj de ASE, kiu enhavas multajn informojn pri la aktivado de kluboj de la sovetunia esperantista organizaĵo.

### ASE — Filio en Ukraina SSR

La 29an de januaro 1980 fondiĝis en Kievo la Ukraina Filio de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj. Partoprenis la fondokongreson la prezidanto de ASE, prof. M. Isajev.

### Kurso en ukraina junulara gazeto

La ukraina junulara gazeto „Molodj Ukraini“ (eldonkvanto ĉ. unu miliono da ekzempleroj) komencis publikigi Esperanto-lecionojn de Boris Kolker (traduko kaj adapto de V. Ĉarin). Pli ol 1700 personoj sendis al la redakcio kontrolajn taskojn. La lecionoj aperas dufoje monate. (laŭ „Esperanto“ 3/80)

### Lenin-ekspozicio

Tiel nomiĝas la ekspozicio malfermita la 22an de aprilo 1980 en la centra regiona biblioteko je la nomo de A. S. Puŝkin (u. Samarkando/Uzbekistano). La organizintoj, Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco kaj la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio, dediĉis ĝin al la glora 110jara naskigdatreveno de V. I. Lenin. En la ekspozicio estis montrataj materialoj (plakatoj, libroj, albumoj, ĵurnaloj, bildkartoj, poŝtmarkoj k. t. p.) temantaj pri la vivo kaj revolucia agado de V. I. Lenin el 11 landoj: Pollando, Hungario, GDR, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Kubo, Vjetnamio, Belgio, Venezuelo kaj USSR. Ni nur menciu kelkajn standojn de la ekspozicio: „Ili vidis Lenin“, „Pri Lenin en Esperanto“, „Ĉi tie estis Lenin“ k. a.

Anatolo Ionesov

### Porpaca ekspozicio

La 28an de februaro en luksa salonego de la Ŝtata muzeo pri historio kaj arto de Uzbeka SSR (Samarkando/Uzbekistano) okazis solena inaŭguro de la porpaca ekspozicio subdevize „Ni bezonas pacon!“, dediĉita al la glora 110jara Naskiĝdatreveno de V. I. Lenin. Same kiel pasinjare la ekspozicion organizis Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco kunlaboro kun la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio. La ekspozicio estis ege impleksa: estis eksponataj diverslandaj porpacaj plakatoj, flugfolioj, infandesegnaĵoj, libroj, revuoj, gluafiŝetoj, insignoj, poŝtmarkoj, gasbalonetoj k. a. pacpropagandiloj. Aparte menciindas la bele ornamitaj folioj kun pli ol 10 000 protestsubskriboj kontraŭ la neŭtrona bombo, kolektitaj de Lenke Dombovári — membro de socialisma brigado de frizistoj el la urbo Kalocsa (Hungario). Speciala elmontrotabulo temis pri la porpaca agado de

MEM kaj pri la kreskanta rolo de esperantistoj en la monda pacbatalo.
La ekspozicion, kiu funkciis dum unumonata periodo, multnombre vizitis ankaŭ eksterlandaj turistoj (i. a. el Vjetnamio, Pollando k. a.). Pri la evento raportis gazetaro, radio kaj televido, aperis specialaj afiŝoj (en la uzbeka kaj rusa lingvoj) kaj invitiloj. Dum proksima tempo la ekspozicio vizitos Taŝkenton, eventuale, aliajn urbojn de USSR.

Anatolo Ionesov

**Infana arto**

Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco organizas decembre 1980 internacian **migrantan** ekspozicion de infandesegnaĵoj kaj aliaj artaĵoj. Ni bonvenigas kontribuojn de ĉiuj landoj kaj kontinentoj. Temo libera. Dorsflanke ne forgesu klare indiki temon, nomon, aĝon, sekson kaj adreson de la aŭtoro! Bonvolu sendi ĉion (se eblas baldaŭ!) al: Petro Poliŝĉuk, SU 700 000 Taŝkento, ul. Engelsa 4, kv. 28, Uzbekistano.
Ni rekompencos ĉion ricevitan! Krome interesaj premioj atendas vin! Ni petas, helpu al ni. Anoncu al infanoj de via lando, ke ni atendas iliajn desegnaĵojn, por ke eĉ la infanoj de via lando helpu popularigi nian internacian lingvon Esperanto. **Propagandu ankaŭ nacilingve!**

**Moskvo: Nova Klubo**

Moskva Internacia Esperanto-klubo informas ke ĉe la Klubo fondiĝis filatelista Esperanto-sekcio „Moskva Filatelista Klubo Esperanto". Ĝia statuto estas aprobita de la Tutsovetia Filatelista Asocio.
Taskoj de la Klubo estas firmigo de interpopola amikeco, disvastigo de Esperanto.
Klubanoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri temoj:
1. Esperanto kaj filatelo
2. Internaciaj organizaĵoj / UNO, UNESKO kaj aliaj
3. Internacia kunlaboro k. a.

Korespondadreso: Mordoĥovič Isaak, SU-113525 Moskvo, str. Dnepropetrovskaja 3-3-139.

**Geologio Internacia III**

Instituto Geologia afable informas ke en julio 1976 aperis 3a volumo de „Geologio Internacia" (146 p.) eldonita okaze de 25a Internacia Geologia Kongreso en Aŭstralio. Ĝi kontinuas la revuon kies volumoj 1 kaj 2 estis eldonitaj en Prago. La 3a volumo de Geologio Internacia enhavas 18 artikolojn pri kristalaj kaj sedimentaj rokaĵoj kaj ankaŭ pri formacioj: permio, kretaceo, terciaro kaj kvaternaro, pri mineralaj krudaĵoj, tektoniko, stratigrafia kaj petrologia klasifikado, esplormetodoj.
Ĝi informas pri geologiaj eldonaĵoj kaj pri geologia literaturo en Esperanto.
La 3a volumo estis eldonita en internacia lingvo Esperanto kaj estas aĉeteebla pere de Ars Polona — ulica Krakowskie, Przedmiescie 7, 00-068 Warszawa, Pollando.
Oni povas ankaŭ aĉeti ĝin senpere en Instituto Geologia (prezo 30 zlotojn) aŭ interŝanĝi por aliaj geologiaj libroj kaj revuoj laŭ adreso: Instytut Geologczny, ul. Rakowiecka 4, 00-975 Warszawa, skrytka pocztowa 126.

**Amikeca renkonto en Taŝkento**

Okaze de vojaĝo pere de nia vojaĝoficejo ni dum la 25. — 28. de aprilo restadis en Taŝkento (Mez-Azio) kaj renkontiĝis kun amiko Ŝakirow. Krome en Samarkand okazis granda renkontiĝo de esperantistoj el ambaŭ distriktoj, kiun mi partoprenis kun granda ĝojo. Amiko Ŝakirow kaj du alvenintaj esperantistoj rakontis pri la movado kaj ĝi kurslaboro en Taŝkento. Ekzistas 3 kursoj po 20 partoprenantoj. Aktive kunlaboras pli ol 100 malnovaj esperantistoj, membriĝis pli ol 300. De la bedaŭrinde malsana k-do Polistschuk mi ricevis la taskon, tre kore saluti ĉiujn geamikojn en GDR.

Friedel Greif

**Iamaj sovetaj kulturoficiroj en Berlin**

Okaze de la 35a datreveno de la liberigo de la germana popolo el sub la jugo de la faŝismo la prezidio de Kulturligo de GDR invitis de 18a de aprilo ĝis 2a de majo 1980 grupon de iamaj sovetaj kulturoficiroj, kiuj post la kapitulacio de hitlera Germanio kunkonstruis la bazon por demokratia germana kultura vivo. Al tiuj iamaj oficiroj ankaŭ apartenas prof. S. N. Podkaminer, vicprezidanto de ASE, el Leningrado kaj la ĵurnalisto G. Korotkievič el Moskvo, membro de la estraro de ASE. Ambaŭ esperantistoj apartenis al la delegacio kaj renkontiĝis kun membroj de CLE.

**Ĉu vi sciis?**

Ke en la Charly-Chaplin-filmo „La granda diktatoro" oni uzas Esperanton por kelkaj firmo-ŝildoj de vendejoj en juda getto? Oni povas deĉifri i. a. „kafejo", vestaĵoj", papervendejo".

(laŭ atentigo de W. Hofmann)

**Ĉenleteroj**

Foje esperantistoj ricevas „ĉenleterojn" aŭ „ĉenpoŝtkartojn", kiuj funkcias laŭ la tiel nomata „neĝbula sistemo": ĉiu el kvin personoj sendas poŝtkarton al novaj kvin personoj, kiuj siavice eksendas po kvin poŝtkartojn ktp. Laŭ abstrakta matematika kalkulo devus reveni al ĉiu partopreninto post kelka tempo 3 125 ($5^5$) poŝtaĵoj, kiuj tamen efektive neniam alvenis aŭ iam alvenos. La tuta „sistemo" nome nur teorie funkcias, eĉ unu persono interrompanta la ĉenon perturbas la tuton.

Krome — kaj tio ofte ne estas konata — kontraŭas tiaj sendaĵoj, kiuj evidente ne servas al la destino de la poŝto (nome: transporto resp. transigo de sciigoj), al leĝaj preskriboj. Laŭ la poŝtordo de 1974-11-21 (publikigita en: Gesetzblatt der DDR, Teil I, 1975, S. 236, § 11, Abs. 1) la poŝto rajtas rifuzi la akcepton de tiaj sendaĵoj. Se la poŝto rimarkas ilin sur la poŝta vojo, ĝi rajtas reigi tiajn poŝtaĵojn al la sendinto .
Se iuj iniciatintoj de ĉensendaĵoj iam promesis bildpoŝtkartojn aŭ kuirreceptojn, aliaj hodiaŭ promesas eĉ „3 125 markojn dum unu monato ĉe nura investo de 5 markoj". Ke tio ne funkcias, pruvas la logiko kaj la praktiko!
Esperantistoj, uzu vian afrankon por pli utilaj poŝtaj kontaktoj kaj malŝarĝu la poŝton de tiaj „ĉ(ĝ)enaĵoj". En via propra intereso! Jürgen Hamann

## Wer schreibt Tonbänder ab?

**Die Abteilung Esperanto sucht eine(n) Bundesfreund(in), die (der) in der Lage ist, deutschsprachige Kassettentonbänder (oder in Esperanto) gegen Honorar abzuschreiben. Voraussetzung ist das Vorhandensein eines Kassettentonbandgerätes mit einer entsprechenden Vorlauf- und Haltemechanik, die ein Abschreiben der Bänder ermöglicht.**
**Interessenten wenden sich an die Abt. Esperanto im Kulturbund der DDR, 1080 Berlin, Charlottentsraße 60.**

### Sporta terminaro

Kelkaj hungaraj samideanoj laboras super manuskripto de multlingva sporta terminaro.
Fakuloj estas petataj skribi al ili, por helpi ilian laboron per kompilado de nacilingvaj vortolistoj.
Anticipan dankon!
Adreso: Budapeŝta Informilo, H-1443 Budapest, Pf. 153.

### Kooperativanoj

Al la mondskala disvastiĝo de Esperanto la vojo nepre kondukas tra la praktika kaj produkta utiligo de la lingvo, la intereson de la homoj ni povas plej facile kapti kaj ekspluati favore al Esperanto pere de la produkta laboro. La granda amaso de kooperativoj kaj enkaj eksterlande sopiregas al internaciaj kontaktoj, sed laŭ la tradiciaj metodoj (t s. per la grandaj naciaj lingvoj) ilia postulo ne plu estas kontentigebla. Resume: Esperanto povas sin proponi ĉi tie en la solvo de la lingvaj problemoj. Jam unu sola esperantisto havas terenon por la agado.
Do, se Vi laboras en ajna kooperativo, ĉu en Hungario, ĉu eksterlande nepre aliĝu ĉe la Kooperativa Esperanto-Komisiono, kiu funkcias apud HEA kaj Nacia Konsilio de Hungaraj Kooperativoj.
Adreso: H-1368 Budapest, Pf. 193.
(El „Budapeŝta Informilo" 5/80)

### Komputista Grupo

Komputista Grupo el Žilina, okupiĝanta per aplikado de komputiloj por regado kaj kontrolo de teknologiaj procesoj (plejparte en kemia industrio), serĉas kontaktojn kun alilandaj samfakuloj.
Skribu al: Inĝ. Vladimir Nemec, Urap, Sedlačkow sad 10, ČS-011 80 Žilina, ČSSR.

### Hidrologoj

22 scienclaboristoj kaj oficistoj ĉe ĉefa Administrejo „Hidrologio kaj Meteologio", Bul. „Lenin" 66, BG-1113 Sofio, Bulgario, en februaro finis elementan E-kurson kaj fondis fakas E-rondon. Ili serĉas kontakton kun gekolegoj, kiuj scipovas Esperanton.

### „Babel"

En la internacia tradukista fakrevuo „Babel", eldonata sub aŭspicio de UNESKO, aperis en la numero 3/79 artikolo de Vilmos Benczik pri la rolo de Esperanto kiel pontolingvo rilate al aziaj literaturoj. „Babel" estas la organo de la Internacia Federacio de Tradukistoj. Ekde 1980 regule enestos en ĝi unu = dupaĝa rubriko „Esperanto-novaĵoj".
Jam antaŭ kelkaj jaroj oni trovis artikolon pri Esperanto en tiu revuo, nome de K. Kalocsay „La traduction en espéranto (n-ro 2/1965, p. 68/70).

### En Kubrat: VARE

La lastan sabattagon de januaro ĉiĵare, laŭ tradicio kubrataj geesperantistoj organizis 6-an Vintran Amikan Renkontiĝon Esperantistan, famekonatan sub kodnomo „VARE".
Alvenis 150 geesperantistoj el tuta Bulgario, gastoj el Hungario kaj ČSSR. La unuan tagon prelegis la temon „Esperanto lingvo de la paco kaj amikeco" kamarado Kunĉo Valev. La ensemblo ĉe la Kulturdomo prezentis al la ĉeestantaro belegan programon. Sekvis fotoekspozicio de Enĉo Balanov — esperantisto el Gorna Orhiahovica „Bulgara renesanca arkitekturo".
Dimanĉe la 27an de januaro matene komenciĝis la internacia E-seminario. Drahomir Koĉvara el Ostrava/ČSSR, prelegis pri „Esperanto kaj mondaj pacamaj movadoj", kies enhavo transformis la seminarion en internacian MEM-kunvenon. Unuanime la kunveno sendis protestleteron al USONA-ambasadorejo kontraŭ la instalado de la novaj usonaj raket-nukleaj armiloj en la landoj de Okcidenta Eŭropo. La lastan temon de la seminario prezentis kamarado Michal Kucin el Košice-ČSSR „Esperanto kaj monda turismo".
(Laŭ Anton Antonov)

**Junularo en Tata**

Tiun ĉi renkontiĝon, kiu okazis en la nordokcidenthungara urbeto Tata de la 2-a ĝis la 4-a de majo 1980, partoprenis proksimume 500 junaj geesperantistoj, inter ili oficialaj reprezentantoj de alilandaj junularaj E-asocioj, kiel ekz. de Bulgario, Sovetunio, Pollando, Slovakio, Alĝerio, Libanono kaj GDR (M. Lennartz, E. Valtin).

La oficiala malfermo estis vendrede vespere (2-an) en la kulturdomo de la urbo. Oni prezentis la organizintojn kaj funkciulojn de HEA. La eksterlandaj gastoj kaj Stefan McGill (prezidanto de TEJO) transdonis salutojn kaj fine sekvis kulturprogramo. Kiel ĉe multaj aliaj aranĝoj ankaŭ tie estis organizita bazaro, sur kiu estis haveblaj diversaj esperantaĵoj. La vespero finiĝis per diskoteko.

La sekvinta tago estis plena de diversaj aranĝoj, certe laŭ ĉies plaĉo io okazis. Antaŭtagmeze oni kolektiĝis en grupoj, kiuj partoprenis aŭ la ŝakkonkurson, la viziton al la Prahoma Muzeo, la banadon en saŭno, la rajdhoron aŭ la kantinstruadon. Posttagmeze la programo daŭris per scikonkurso pri Tata kaj forumo pri aktualaj demandoj de la Esperantojunularo.

Etosan kulminon peris la enhavriĉa vespera kulturprogramo kun teatraĵo de la Esperanto-Studentteatro el Zagreb, kun skeĉoj, prezentitaj de Stefan McGill kaj prezentado de la Márvány-dancensemblo el Tárdos. Ankaŭ tiu lasta vespero finiĝis per dancado.

Dimanĉe matene, antaŭ la hejmenvojaĝo de ĉiuj partoprenintoj oni malkovris JER-memortabulon en la tendaro kaj solene fermis la sukcesan renkontiĝon.

Elke Valtin

**Konkurso**

Okaze de sia 10-jara jubileo la asocio Monda Turismo anoncas novan programon de la kampanjo „Esperanto en la internacia turismo". La estraro de Monda Turismo alvokas ĉiujn geesperantistojn, partopreni la efektivigon de la jenaj taskoj:

01. Ekinteresigi vojaĝoficejojn pri Esperanto.
02. Konvinki ĉiĉeronojn kaj ekskursgvidantojn en vojaĝoficejoj lerni Esperanton. Ankaŭ vi partoprenu kurson kaj fariĝu ciĉerono kaj ekskursgvidanto.
03. Informi nin pri hoteloj, kampadejoj, oficejoj, entreprenoj, restoracioj, kiuj priservas internacian turismon kaj utiligas Esperanton.
04. Instigi vojaĝoficejojn kaj eldonejojn eldoni prospektojn gvidlibrojn, mapojn, ilustritajn poŝtkartojn, glumarkojn, k. a. en Esperanto.
05. Aranĝi ekspozicion, vitrinon aŭ aliforme prezenti atingojn de la internacia Esperanto-turismo.
06. Informi kaj varbi por Esperantoaranĝoj anoncitaj en la turisma Esperanto-Kalendaro.
07. Partopreni internaciajn Esperantoaranĝojn, renkontojn k. s. kaj raporti al ni pri siaj impresoj. Se eble oni ilustru la skribitajn impresojn per fotografaĵoj kaj diapozitivoj.
08. Aperigi artikolojn pri utiligo de Esperanto en turismo en nacilingvaj kaj esperantaj revuoj.
09. Proponi al organizantoj de internaciaj aranĝoj utiligi Esperanton.
10. Fariĝi membro kaj fakdelegito pri turismo.
11. Aliĝi al asocio Monda Turismo kaj varbi membrojn por ĝi.
12. Elpensi kaj proponi novajn eblecojn por disvastigo de la Esperanta turismo.

Raportojn pri la farita agado en tri ekzemplerojn oni sendu **ĝis la 31-a de oktobro 1980** al la respondeculino pri la kampanjo „Esperanto en Turismo" s-ino Elizabeta Pallos, Ybl Miklós u. 9. I. em. 2. H-7633 Pećs, Hungario.

La estraro de Monda Turismo dum la VI-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo, kiu okazos en 1980 j., pritraktos la raportojn kaj aljuĝos jenajn premiojn inter la konkursantoj:

— 5 senpagajn restadojn en 1981 j. dum la „Tagoj de Bydgoszcz", kiujn donacis „Esperantotur", Pollando.
— 3 senpagajn restadojn dum la Turista Esperanto-Semajno — 1981 en Slovaka Paradizo, kiujn donacis Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko.
— 3 senpagajn restadojn en Pécs dum al Semajno de Internacia Amikeco — 1981 j. disponigitaj de la Turisma Komisiono de HEA.
— 1 senpagan partoprenon en esperanta aranĝo en Finnlando (elektebla de la gajninto) en 1981 j. La premion disponigis Esperanto-Asocio de Finnlando.

Krom la 12 supremenciitaj premioj la estraro de Monda Turismo aljuĝos pliajn premiojn disponigitajn dum la jaro de la organizantoj de internaciaj esperantaj aranĝoj. Estraro de Monda Turismo

**Seminario por ekspertoj**

CLE decidis novan serion de kvalifikigaj seminarioj, kiuj estas gvidataj komplete en Esperanto, prezentas al la partoprenantoj superrigardojn pri la teorio kaj praktiko de Esperanto kaj ĝia movado kaj ĉe la fino ebligas ekzamenigon. Tia seminario okazis de la 17a ĝis 21a de junio 1980 en Miersdorf ĉe Zeuthen (Berlin). Partoprenis 26 personoj, kiuj aŭskultis prelegojn de D. Dahlenburg, D. Blanke, J. Hamann kaj L. Schödl. 13 partoprenintoj ekzamenigis laŭ nivelo B respektive C.

## Bulgario

Rumen Popow, 5058 Hotnitza, **Weliko-Tirnowo, 38-j.** fraŭlo, elektroteknikisto, dez. kor. k. geesp. 30—45j. p. ĉ. t.; samtempe kursgvidanto de E-kursoj de 12 ĝis 18j. gelernantoj el urbo Weliko-Tirnowo, kiuj dez kor. k. fremdlandanoj p. ĉ. t.

Geesperantistoj de Esperanto-societo „Leono", 4468 Momina, **Klisura (Pazarĝik),** 9—45j. (gelernantoj, geoficistoj, geinstruistoj) dez. kor.

## GDR

Komencantino, 18., dez. kor. k. komencanto: Iris Franke, 9202 **Frauenstein,** Ostrandsiedlung

Janusz Stajszczak, **Wilhelm-Pieck-Stadt Guben,** Fučik-Straße 9/6, dez. kor. k. gejunuloj el GDR pri sporto prec. futbalo

## Pollando

Junulo, 19j., dez. kor. tutmonde pri turismo, tekniko, moderna muziko: Jaroslaw Radomski, str. Wspolna 35, **18-320 Ciechanowiec**

Janina kaj Andrzej Malaszowski (geedzoj, biologoj), **58-309 Walbrzych**, str. Hirszfelda 4 m. 13, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Joanna Malaszowska (8jara knabino) dez. kor. kun gejunuloj, kol. pm, bk: **58-309 Walbrzych,** str. Hirszfelda 4 m. 13

## Soveta Unio

21j. fraŭlo, dez. kor. k. geesperantistoj tutmonde pri moderna muziko, kol. pm, bk, diskojn: Jurgis Valiunas, **234593 Punia,** Alytaus Raj., Litovio

Naumo Kovnators, **228428 Daugarpilo/** Latvio, Fabrikas 16a, dez. kor.

Siberia Esperanto-Klubo lige kun la 25-jariĝo de sia karbminista tajga urbo organizos la 25an de junio internacian letervesperon. Bv. sendi bk-n, leterojn, fotojn, afiŝojn aŭ turisman prospekton pri via urbo aŭ loko. Ĉiu skribinto ricevos de ni bk, foton pri Siberio aŭ dankleteron kaj novan siberian leteramikon: Esperanto-Klubo, **652870 Mejdureĉensk-centr,** ab/ja 60, Kemerovskaja obl.

24j. junulo, kinomekanikisto, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Vidas Bajoras, **234430 Jurbarkas,** Upeiviu 21

Lernanto, 14j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Aleksandr Ivanov, **644066 Omsk-66,** str. Kvasnij Putj, d. 139, „A", loĝ. 24

23j. medicinisto dez. kor. pri medicino, muziko, literaturo, sporto, turismo, lingvoj, kol. bk: Revo Rostislav Miĥalovič, **250000 u. Černigov,** str. Lenina 17 kv. 43

Lernantinoj dez. kor. tutmonde, kol. bk:
- Magdalina Kolĉar, **295560 Korolevo,** ul. Ŝĉerbakova 25, 16j.
- Maria Skuns, **295560 Korolevo,** ul. Ŝĉerbakova 15, 16j.
- Eva Rodvanska, **295560 Korolevo,** ul. Lenina 46, 15j.
- Natalia Jerjomenko, **295560 Korolevo,** ul. Ŝaĥtarska 7/4, 15j.

Gestudentoj de l'energetika instituto dez. kor.:
- Raisa Azimova, **153022 Ivanovo,** str. Velijskaja 51—54, 21j.
- Galina Kojina, **155500 Furmanov,** str. Socialistiĉeskaja 29—20, 20j.
- Lev Gorŝkov, **153002 Ivanovo,** str. Kalinina 5—28, 20j.

Geesperantistoj, 18—45j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. Komuna korespondadreso: Koresponda servo de Kieva Esperantista klubo, pk. 933, **252087 Kiev 87,** Ukrainio

Instruisto, 32j., dez. kor. pri lingvoj, literaturo, popolkutimoj kaj tradicioj: Antanas Vaitkevičius, **235643 Alsédžiai,** Plunges raj. Žalioji 4—4

Lernanto, 13j., dez. kor. k. samaĝuloj tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Gintaras Jurkaitis, **235643 Alsédžiai,** Plunges raj., Paupio 7, Litovio

Lernanto, 14j., dez. kor. k. samaĝuloj pri historio, fotado, sporto: Yuri M. Ŝevĉenko Puŝkin Pr. **64-203 Minsk 220073**

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 731